# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo marto 2021**


## DECIDOJ DE LA ĜENERALA KUNVENO DE MEL

La 1an de februaro 2021, kiel anoncite, okazis la ordinara ĝenerala asembleo de Madrida Esperanto-Liceo. Ĉeestis 12 homoj, ĉu fizike, virtuale aŭ reprezentitaj.

Laŭ la anoncita tagordo, la estraro informis pri la evoluo de la membraro, kiu restas stabila. Oni diskutis la financan raporton de 2020, la buĝeton por 2021, la agad-raporton 2020 kaj la proponon pri agad-programo por 2021. Tiuj ĉi estis unuanime aprobitaj.

Estis aprobite ke la kotizo restu la sama, 12 eŭroj.

Memoru ke vi povas nun aliĝi al Liceo,por la jaro 2021, plenigante la aliĝilon kiu troviĝas en la fako"Dokumentoj" de la retejo de MEL: http://esperanto.es/mel/, aŭ skribante al madrid@esperanto.es.

## MEL EN TŬITERO




Alia decido de la ĝenerala kunveno, estis la malfermo de konto de MEL en la socia retejo Tŭitero (Twitter). Do, de februaro vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida. Sekvu kaj abonu ĝin por scii pli pri niaj agadoj kaj renkontoj.

Aliflanke, MEL decidis la fermon de la konto en la retejo MeetUp, kiu ne donis sufiĉajn avantaĝojn. Memoru ke se vi deziras partopreni en la renkontiĝoj de la asocio, vi povas scii pri ĝi pere de niaj sociaj retoj aŭ pere de la servo EventaServo.org.

## RENKONTIĜO KUN DEBATO

La venonta unuasabata renkontiĝo okazos la 6an de marto, denove virtuale, pere de la sama kutima adreso en la retejo Jitsi: https://meet.jit.si/MadridaSabataRenkonto.

En tiu ĉi venonta renkontiĝo ni organizos kolokvon, pri la temo "Ĉu nefikcio povas esti literaturo?". Ĝin gvidos Toño del Barrio, kiu enkondukos la temon surbaze de sia artikolo pri sama temo en Libera Folio: https://www.liberafolio.org/2021/02/23/kaj-la-ceter-cu-ne-literaturo/ kaj la teksto en sia blogo: http://www.delbarrio.eu/blo/. Post tiu enkonduko sekvos debato, en kiu povos partopreni ĉiu ĉeestanto.

La komenca horo estas la 18,00 (madrida kaj centreŭropa tempo). Pliaj informoj ĉe la retejo: https://eventaservo.org/e/MartoEnMadrido.

Memoru ke la babilejo estas malferma por iu ajn esperantisto, komencanto aŭ progresinto, madridano aŭ loĝanto en alia loko.


madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com

## KONGRESO VIRTUALA

Multaj scivolas kio okazos al la Hispana Esperanto-Kongreso, kiu, planita por 2020 en Comillas (Kantabrio), estis prokrastita ĝis tiu ĉi jaro. La estraro de Hispana Esperanto-Federacio, en konsento kun la Loka Kongresa Komitato, taksis ke la situacio ankoraŭ ne pliboniĝis sufiĉe, por permesi libere vojaĝi inter la diversaj regionoj de Hispanio, kaj des malpli kunveni en fermitaj lokoj.




Do, ĝi estis devigita ŝanĝi denove la planojn, sed decidis ke tamen kongreso okazu en 2021, sed ĝi disvolviĝos en la dua duono de la jaro, kaj havos bazan virtualan karakteron, kvankam HEF studas la eblon ke la virtualeco de la aranĝo estu kompletigata pere de diversaj lokaj samtempaj renkontiĝoj, se la sansituacio tion ebligos. Kiel eble plej baldaŭ oni difinos la daton kaj ceterajn priajn informojn. Estu do atentaj al la novaĵoj, pri kiuj ni daŭre informos.

Tiu estos la 79a Kongreso, kaj pri la 80a Hispana Kongreso, estis decidite ke oni plu konservos la planon ĝin okazigi en la bela vilaĝo Comillas, preskaŭ certe en la dekomence elektitaj tagoj, tio estas de la 30a de aprilo ĝis la 4a de majo, kompreneble en 2022. La LKK de tiu 80a kongreso, okazonta en Comillas, jam informis ke ili daŭre laboras por ke tiu kongreso estu vera festo de la hispana esperanta movado.

## ESPLORO PRI ESPERANTO EL LA SOCIA KAJ KULTURA ANTROPOLOGIO

Hispana Esperanto-Federacio subskribis oficialan interkonsenton pri eduka kunlaboro kun la Aŭtonoma Universitato de Madrido, por la realigado de praktikaj studoj kun ties studentoj. Kiel komenco, la interkonsento kovros la realigadon de esploro (kiel finkariera laboraĵo) en la fako Socia kaj Kultura Antropologio, kiu havos kiel celon la lingvon Esperanton kaj la esperantistan movadon. Tiu esploro havos parton teorian, sed ĝi baziĝos ankaŭ en aro da enketoj kaj intervjuoj kun parolantoj de Esperanto en Hispanio, kun la celo analizi la ecojn de la kolektivo el la vidpunkto de tiu socia disciplino.

La personoj dezirantaj partopreni la studaĵon, povas skribi al la adreso: letero@esperanto.es por koni la detalojn.

## POR PLIAJ INFORMOJ

Por informiĝi pri aliaj tutmondaj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la novan retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

~~Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo~~

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com